

& Prologo:

< Rekante 15 el 23 batoj por strofo, entute 644 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (/LaaLaTi dodo TiTi LaLa; doodore mido; TiTi LaLa;

(#Rekantaĵe: LaaLaTi dodo TiTi LaLa; doodore mido TiSo LaLa; miimifa mire dore mido Ti La a))×28)+

(&Strofoj:

'1 Mi foje, iel, malvarmumis ; kaj pri la vivo ; ekcerbumis.

(×:; **Estu nun ĝoja kaj survoja ; kaj ĉiutage vivu age ; Poste ripozu kun ni en la danco.**)

'2 Kaj pri la bestoj, ; pri la homoj, ; pri la objektoj, ; pri la kromoj.

'3 Kaj pri la arto, ; politiko, ; pri la bonfarto, ; pri l' taktiko.

'4 Tre ete pensis ; mi pri floroj, ; simile ankaŭ ; pri la moroj.

'5 La tempo fluis ; malrapide ; dum mi enuis ; invalide...

'6 Se venus al mi ; nur vizito, ; min prikonsoli ; en la lito!

'7 Kaj mi suspiris ; pro sopiro ; ludante rolon ; de martiro.

'8 Subite tie - ; la similo! ; mem de EZOPO ; propra filo!

'9 Mi donis al li ; fortan brandon ; por vekti lian ; propagandon.

'10 Jam eĉ ne eblas ; doni notojn, ; kiel li ŝutis ; anekdotojn.

'11 Nu, pri la bestoj, ; pri la homoj, ; pri la gigantoj, ; pri la gnomoj.

'12 Kaj pri la floroj, ; pri moralo, ; eĉ pri birda ; karnavalo.

'13 Galimatio ; tre abunda ; estis vizito ; tiu lunda.

'14 Kun intereso ; fajre arda ; sekvata estis ; dua, marda!

'15 Li venis ankaŭ ; ĉi merkredon, ; se doni volas ; vi la kredon.

'16 Ke li ne vakis ; ĝuste jaŭde, ; mi dankis ĝoje ; kaj aplaŭde.

'17 Li ne ellasis ; eĉ vendredon, ; daŭrigis kun mi ; fabel-bredon.

'18 Mi jam sabate ; ŝvite naĝis ; dimanĉe li ĵus ; forvojaĝis.

'19 Dum la semajno, ; en sep tagoj, ; ni iĝis bonaj ; kamaradoj.

'20 hazarde ankaŭ ; je la sepoj - ; viciĝas niaj ; rakontetoj.

'21 Se vi suspektas - ; ĉe diablo - ; ke eble mankas ; iu fablo,

'22 kontrolon faru ; per kalkulo ; mi en sciencoj ; estas mulo.

'23 Apenaŭ skribi ; mi ja spertas, ; nur en eraroj ; prete lertas.

'24 Kaj Esperanton - ; kia blago! ; ellernis mi en ; duontago.

'25 Pro tio ankaŭ - ; povas esti - ; tre eblas ion ; ne digesti!

'26 Negrave tamen ; laŭ ezopo ; elekton donas ; la multopo.

'27 Mi povas krome ; rekomendi ; ĉi-ĉion ankaŭ ; ree vendi.

'28 Fin-fine, nu vi ; povas certi - ; fabelojn ĉiu ; scias verki!)